# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (962) • 2023 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

## Gustave Doré
(1832–1883)
franca pentristo kaj
gravuristo

La aliformiĝo
(Mateo 17,1-9)
→



La samariano
(Luko10:33) ↓

Moseo kun
la dekalogo
(Eliro 20) ↘





**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe Cousson
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 philippe.cousson@sfr.fr

**Sekretario**: Pavel Polnický;
✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes Ráczkevy-Eötvös
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof Åradsson
✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel Polnický

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. 💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| Aliformiĝo | 99 |
| Mia spirita vivo | 102 |
| Poděbrady — 800 jaroj | 108 |
| Dek helpoj — pri la Dekalogo | 110 |
| Letero el Tanzanio | 114 |
| Aliĝilo al kongreso 2024 | 115 |
| Informetoj | 119 |
| Kanto: Kiel cerv' pri akvofont' | 120 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, ĵus nun miaj pensoj estas plenaj de ĉiutagaj fluoj de novaĵoj kaj raportoj pri teruraĵoj. Povas esti novaj aŭ pli/malpli malnovaj. Povas esti grandskalaj militoj aŭ pli lokaj mortpafoj aŭ naturaj katastrofoj. Ĉie homoj perdis sian vivon aŭ perdis iun familianon aŭ perdis siajn vivkondiĉojn. Mi timas, ke mi en tiu 'troa' fluo riskas elfermi min el la mondo kaj volas resti en mia propra kaj relative trankvila kaj 'riĉa' bobelo. Sed ni rezistu al tiu emo kaj ni ne forgesu la suferantojn. Ni laŭpersone faru aŭ helpu per tio, kio eblas.

En tiu ĉi numero vi trovas aliĝilon al la sekvontjara KELI-kongreso, kiu okazos en Hungario, iom norde de Budapeŝto en Vác. La temo estos *Justeco kaj paco sin kisas* laŭ Psa 85,10. Kaptu la okazon veni al la kongreso. Ĝuu la kristanan kaj familian etoson.

Krome en la revuo vi trovas diversspecajn kaj interesajn artikolojn. Sendu al mi mallongan raporton pri io, kion vi spertis lastatempe. Tiel vi riĉigas la gazeton kaj legadon al viaj kunlegantoj.

# Aliformiĝo

## Prediko dum la kristana kongreso en Białystok 9an de aŭgusto 2023

Philippe Cousson, FR

Kaj post ses tagoj Jesuo prenis kun si Petron, kaj Jakobon, kaj Johanon, lian fraton, kaj kondukis ilin sur altan monton aparte; 2 kaj li estis aliformita antaŭ ili, kaj lia vizaĝo lumis kiel la suno, kaj liaj vestoj fariĝis blankaj kiel la lumo. 3 Kaj jen aperis al ili Moseo kaj Elija, parolantaj kun li. 4 Kaj Petro responde diris al Jesuo: Sinjoro, estas bone por ni esti ĉi tie. Se vi volas, mi faros ĉi tie tri laŭbojn: unu por vi, kaj unu por Moseo, kaj unu por Elija. 5 Dum li ankoraŭ parolis, jen luma nubo superombris ilin; kaj jen voĉo el la nubo, dirante: Ĉi tiu estas Mia Filo, la amata, en kiu Mi havas plezuron; aŭskultu lin. 6 Kaj aŭdinte tion, la disĉiploj falis sur sian vizaĝon, kaj tre timis. 7 Kaj Jesuo alvenis kaj ektuŝis ilin, kaj diris: Leviĝu, kaj ne timu. 8 Kaj levinte siajn okulojn, ili vidis neniun krom Jesuo sola. 9 Kaj dum ili malsupreniris de la monto, Jesuo ordonis al ili, dirante: Rakontu al neniu la vizion, ĝis la Filo de homo releviĝos el la mortintoj.

Mateo 17:1-9

Karaj gefratoj en Kristo, tre konata teksto, almenaŭ por la kristanoj. Estas interese esplori ĝin iom pli detale. Kiam oni supraĵe legas aŭ aŭdas ĝin, oni mistrafas multajn aferojn. Tiu teksto situigas Jesuon en la historio de la savo, en la plano de Dio. Ĝi estas kiel epifanio, manifestiĝo de la dieco de Jesuo, de la interveno de Dio.

Antaŭ kelkaj tagoj, mi komentis okaze de funebra ceremonio la psalmon 121, teksto elektita de la mortintino. Ŝi ankaŭ elektis la kantotajn himnojn. Tiu psalmo apartenas al la psalmoj de la suprenirado, kantata dum la pilgrima irado al Jerusalem. Ĝi estas psalmo de laŭdo, de konfido en Dio. Ĝi estas kredkonfeso. La pilgrimantoj supreniras al la monto Cion, t.e. Jerusalem, kie Dio ĉeestas.

Ekde la monto Sinaj dum la eliro el Egiptio, la monto estas loko por manifestiĝo de la ĉeesto de Dio. Ĉi tie Li manifestiĝis al eta grupo, tri disĉiploj.

Kaj ĉi supre, la disĉiploj vidis mirindaĵon, la vizaĝo de Jesuo brilas, lia vestaĵo



aperas blankega. Memoru, kiam Moseo revenis el la monto, kie li renkontis vizaĝ' al vizaĝo Dion, li ne konsciis ke lia vizaĝo brilis.

Kaj kiel hologramo aperas al la okuloj de la tri disĉiploj kaj Moseon kaj Elijan. Ili interparolis kun Jesuo, pri Jesuo eble. Tie renkontiĝas la leĝo, la Torao, en formo de Moseo, kaj la profetoj en formo de Elija. La Leĝo kaj la Profetoj, tio estas la tuta hebrea Biblio, nia Malnova aŭ unua Testamento, ili parolas pri Jesuo, ili dialogas kun Jesuo.

Ni restas en la rakonto pri la dezerto. Petro parolas. La teskto diras ke li respondas, sed oni ne konas la demandon, eĉ ĉu estis vere demando. Petro proponas fari tendojn. La Esperanta Biblio bone tradukis "laŭbojn". Tiuj estas konstruitaj de la popolo, kaj ankaŭ de la nunaj judoj, por rememorigi pri la eliro el Egiptio kaj la 40 jaroj en la dezerto. La vorto ĉi tie uzata en la greka originalo estas kaj tiu laŭbo, kaj tendo, sed ankaŭ la tabernaklo, loko kie ĉeestas Dio. Petro volas konservi la nunan situacion.

## *Tiu estas mia Filo. Aŭskultu lin!*

Poste alvenas la nubo. Denove aludo al la dezerta vojaĝo, kiam en nubo Dio gvidis la popolon, en nubo kaj en fajrokolono. Tie luma nubo superombras la disĉiplojn.

El tiu nubo venas voĉo. Proklamo pri Jesuo : *Tiu estas mia Filo. Aŭskultu lin!*

Petro volis paroli. Li devas aŭskulti. Petro volis fari. Li devas aŭskulti.

Post la aŭdado, la tri disĉiploj falas vizaĝon teren. Ne estas kiel estis por Moseo. Ne estas kiel por Jesuo. Ambaŭ vizaĝoj brilis. La disĉiploj timis, vere timis. Kompreneble, la ĉeesto de Dio estas timiga, danĝera. Almenaŭ tion ripetas la tekstoj, kiujn ili bone konis.

Sed anstataŭe, Jesuo moviĝas al ili : li alproksimiĝas kaj tuŝas ilin. Tiel estas vere la ĉeesto de Dio.

Vekiĝu, li diris, kaj ne timu. Tiam ili levas la okulojn, ĉu al la monto kiel diras la 121a psalmo ? Kaj jen, Jesuo estas sola.

Post la emocio, oni malsupreniras el tiu monto. Kaj ili ricevas strangan ordonon de Jesuo : Rakontu al neniu. Kion rakonti ? Ĉu vizio ? Ĉu vidado ? Ĉu bildo ? Ĉu imago ? Ĉu renkonto ? Ĉu spektaklo ? Ĉu strangaĵo ? Ĉu mirindaĵo? La vorto povas havi ĉiujn ĉi tiujn signifojn.

Ĝis la Filo de homo vekiĝos el la mortintoj. Same kiel la disĉiploj antaŭ kelkaj minutoj vekiĝis post la tuŝo de Jesuo. La vorto tie uzata estas unu el la du grekaj vortoj por la releviĝo de Jesuo, por la resurekto. Ili estas preskaŭ sinonimaj. La ĉi tiea pli signifas vekiĝi kiam la alia pli signifas leviĝi, stariĝi.

Post la vidado, post la vekiĝo, venas la ekiro. Kiuj vortoj devas resti al ni por nia pilgrimado en nia mondo ? Kiuj paroloj ? Kiuj instigoj ?

Petro volis fari, meti, lokigi tendojn, laŭbojn. Tiuj estas ĉiam provizoraj, sed Petro deziris resti tie, ĉar estis bone por li. Tamen, tio ne estas la intenco de Dio.

La intenco de Dio por ni ne estas fari, ne estas konservi — la intenco de Dio por ni estas aŭskulti.

La rilato al Dio, ĉu oni nomu tion religio aŭ ne, estas aŭskulti, ne estas fari.

La kunparolo inter Jesuo, Moseo kaj Elija diras ke ne estas rompiĝo inter la Malnova Testamento, la hebrea Biblio kaj nia Nova Testamento. Tion bone komprenis la Eklezio ekde la komenco, ĉar ĝi konservis la tekston de la hebrea Biblio, de la juda Biblio, la prapatroj komentis tiujn tekstojn.

Kristanismo ne anstataŭas judismon. Ili ambaŭ restas sub la promesoj de Dio. Sufiĉas relegi kelkajn ĉapitrojn de la epistolo de Paŭlo al la Romanoj.

Kvankam en ĉi tiu teksto, Dio, la Patro, neniam estas nomata. Sed multaj detaloj indikas ke li ĉeestis en tiu momento. La luma vizaĝo de Jesuo, la nubo, la voĉo. Eĉ kiel ofte, la uzo de la greka verbo **ἐγένετο** kvankam ŝajne tute simpla, oftege indikas la diecon de Jesuo.

La lumo dia estas tiu lumo kiu iras en la ombron, kiu revelacias la ombron. Kiom da ombro en nia koro, en nia vivo? Ĉu ni pretas elteni la lumon de Dio ? Ĉu ni falas sur nian vizaĝon ? Jesuo alproksimiĝas kaj tuŝas nin : Vekiĝu, ne timu.

La disĉiploj post la vekiĝo levis siajn okulojn. Al Jesuo, al la monto ? Kaj post levado, post tiu leviĝo, ili malsupreniris. Por tiu momento en fakte alia mondo, ili revenas al la malsupra vivo, kun memoraĵoj. Ili poste komprenis ke Jesuo apartenas ankaŭ al tiu alia mondo. Al tiu mondo oni povas aparteni tra aŭskultado, ne tra farado.

Troviĝas ankaŭ en tiu rakonto la komparo inter vidado kaj aŭdado. Oni legas vortojn kun la sama radiko : la okuloj : kiam Moseo kaj Elija aperis al iliaj okuloj, kaj post la vekiĝo, ili levas la okulojn, Sur la monto, subite ili vidas kun Jesuo Moseon kaj Elijan. Post la vekiĝo, ili vidas Jesuon sola. Sed ĉu ili komprenis ? Ŝajne ne. Antaŭ ol paroli pri io vidata, oni devas kompreni pri kio temas. Ili komprenos post la releviĝo de Jesuo. Gravas la proklamo de la voĉo : *Aŭskultu lin.* Se vi volas kompreni, se vi volas paroli, vi unue devas aŭskulti.

Ili devis aŭskulti Jesuon. Kaj ni ? Jesuo ne plu estas inter ni. Tamen la respondo estas en la rakonto mem. Ni devas aŭskulti la parolojn interŝanĝitajn inter la tri sur la monto, inter Jesuo, Moseo kaj Elija, ni devas aŭskulti ambaŭ partojn de nia Biblio, la Leĝon kaj la Profetojn (kaj ankaŭ la psalmojn), t.e. nian Malnovan Testamenton (ankaŭ dirita Unua Testamento) kaj la Novan Testamenton. La lasta nek nuligas nek anstataŭas la unuan. Ili dialogas inter si.

Kiam oni ne komprenas, oni faras kiel Petro, oni interrompas la parolantojn. Kaj kio okazis ? Dio mem interrompis Petron. *Aŭskultu lin !*

Kion do diri ? Kiam Dio manifestiĝas en via/nia vivo, ne restu mirantaj. Malsupreniru, aŭskultu kaj poste vi povos rakonti kion vi travivas. Sed nepre aŭskultu lin ! Vekiĝu ! Ekstaru ! Kaj ne timu ! La Filo de homo releviĝis !

Amen.

# Mia spirita vivo

Petro Chrdle, CZ

**En junio 2023 aperis mia verko *Mia vivo kun Esperanto*[1], kie en la paĝoj 113–123 mi priskribas evoluon de mia spirita vivo, ĉar ĝi ofte rilatas al Esperanto. Mi prezentas nun kelkajn fragmentojn el tiu parto, kiujn mi distingos per ***, por ke estu klare, ke ne ĉiam la sekva teksto logike kontinuigas la antaŭan. Do jen:**

Mia konfeso pri mia kredo-nekredo certe laŭ multaj ne apartenas al la libro pri Esperanto-vivo. Mi envicigis ĝin tien, ĉar mia interna spirita mondo kaj Esperanto interrilatas. Sed por povi kompreni tion mi devas komenci ĉe mia infanaĝo, kvankam tiam mi pri Esperanto vere eĉ ne estis aŭdinta.

Kiel infano mi kreskis en ekumena familio, kvankam tiam tio preskaŭ ne eblis. Sed la amo de miaj gepatroj estis pli forta ol ilia aparteneco al malsamaj eklezioj. Mia panjo estis konvinkita katolikino, kiu plurfoje ripetadis, ke ŝia panjo, kiam ŝi adiaŭis kun ŝi mortanta (mia panjo orfiĝis kiel 10-jara) emfazis al ŝi, ke ŝi ĉiam kaj en ĉiu okazo ĉefe restu bona katolikino. Male mia paĉjo devenis de husana eklezio, tiam nomata ĉeĥoslovaka, kies fidelega membro estis lia panjo (la patron li ne plu havis) kaj mia paĉjo havis en la eklezio funkcion de kasisto de la loka komunumo.

Sed la amo faras miraklojn. Mia paĉjo sen scio de sia familio (panjo kaj 8 gefratoj) ŝanĝis sian eklezian apartenecon kaj fariĝis katoliko por povi ricevi la katolikan antaŭgeedzecan preparon kaj edziĝi.

Kiam tion eksciis lia panjo, ŝi furioziĝis, ke ŝi ne povas akcepti sian katolikan filon kaj jam minacis, ke vere li perdos sian originan familion. Por eviti tion li revenis sen scio de mia panjo al sia origina eklezio, en kiu li ne interrompis la funkcion de kasisto, eĉ dum li estis oficiale katoliko. Cetere, li estis tiel nomata *nur varmeta* kredanto, kiu, male ol panjo, ne kutimis preĝi kaj ankaŭ la diservojn li vizitadis nur esceptokaze. Nun male furioziĝis mia panjo, ke ŝia panjo en la tombo turniĝos kaj neniam




Petro Chrdle dum EEK 2018 en Poděbrady

pardonos al ŝi, ke ŝi kunvivas kun nekatoliko. Do ŝi postulis de mia paĉjo promeson, ke li lasos ŝin eduki la infanojn, kiujn ili esperebIe havos, kiel bonajn katolikojn. Tion mia paĉjo volonte al ŝi promesis. Hodiaŭ tiu problemo por junaj paroj ne ekzistas, ĉar ambaŭ eklezioj reciproke agnoskas la bapton[2] kaj la apartenantoj de ambaŭ konfesoj povas geedziĝi senprobleme. ***

Kiam mi komencis percepti la ĉirkaŭan mondon, miaj panjo kaj avinjo jam estis en tre amikaj rilatoj. Mi tiel estis sen ajnaj riproĉoj de avino baptita laŭ katolika rito. Tamen mi devis ensorbi ankaŭ la etoson de ĉeĥoslovakaj diservoj, ĉar mia avino, la panjo de mia paĉjo, servis en la preĝejo kiel dommastrino. Ŝi hejtis, preparis ĉion por la diservo ktp., kaj pro siaj aĝo kaj malforteco ŝi bezonis helpon. Ĉar la ĉeĥoslovaka diservo komenciĝis duonhoron post la fino de la katolika, kaj ambaŭ estis proksimaj, iradis tien helpi al ŝi mia paĉjo aŭ pli ofte mia



Albrecht Kronenberger – mia unua spirita amiko en Esperantujo

pli aĝa frato. Sed poste tien komencis iradi ankaŭ mi, kaj ĉar mi tre amis mian avinjon kaj krome plaĉis al mi sekvi la diservon, baldaŭ iradis tien nur mi. Jam tiam mi cerbumis, kial estas tiu preskaŭ malamikeco de tiuj du homgrupoj, se ili preĝas preskaŭ same al la sama Dio, ununuran diferencon mi vidis per miaj infanaj okuloj, ke la pastoro estas alimaniere vestita (ĉiam en nigra vesto kun blanka ŝalo) ol la katolika sacerdoto.

Post la diservo iam ni revenis hejmen triope. Ne nur, ke ĉiudimanĉe vizitadis nin avinjo por kune tagmanĝi, sed ankaŭ la pastoro Josef Špak, kiu post la tagmanĝo ofte sidis en loĝĉambro kun paĉjo kaj ili tie (laŭ mi) *ludis kun paperoj* kaj nur sekve ili ludis kun mi. *** Parenteze, post la politika liberiĝo en la jaro 1989 tiu *mia onklo* fariĝis patriarĥo de la ĉeĥoslovaka husana eklezio. ***

Jam en tiu nekredanta periodo mi amikiĝis kun unu pastro, kiu fariĝis nia proksima amiko kaj neniel al ni trudis sian kredon. Tio okazis dum iu PSI (Paska Seminario Internacia) en Germanio kaj temis pri katolika sacerdoto Albrecht Kronenberger.

Fakte ili amikiĝis unue kun Stanjo pro ilia kantemo (male mi kantema ne estas), sed ni ofte babilis triope kaj mi havis al li demandojn rilate al la germana lingvo, kiujn li volonte klarigis al mi. Eĉ li aĉetis kaj donacis al mi la Duden-vortaron kun la rekomendo, ke mi konsultu ĝin, ĉar tie mi trovos respondon al preskaŭ ĉio, kion mi demandis. Tiam mi ankaŭ partoprenis la unuan ekumenan diservon, ne kiel revenanta pentanta ekskristano, sed kiel scivolemulo. ***

En la jaro 1999 Stanjo malsaniĝis per tre danĝera speco de kancero, pri tio mi jam skribis. Kiam ŝi jam vere suferis kaj iam eĉ devis veni la sukurista helpo por injekti ŝin per morfino, foje okazis jena aventuro: Dumnokte vekis min forta voĉo de Stanjo, kiu ripete kriis ankoraŭ dormanta *ne, mi ne volas* kaj dume ŝi vekiĝis kaj ve-kriis pro doloro kiel neniam antaŭe. Ŝi estis tre rezista kontraŭ doloro, do mi sciis, ke ĉi-foje temas pri io eksterordinare malbona.

Mi vokis la sukuristan helpon, ĝi venis post eble kvin minutoj, pikis al ŝi morfinon kaj rekomendis, ke mi veturigu ŝin venontan tagon al la malsanulejo por nova esploro. Post ioma tempo ŝi trankviliĝis kaj rakontis al mi, kio okazis. Ŝi en sonĝo perdis ĉiun doloron kaj sentis nekredeblan feliĉon; dume nevenkebla forto suĉis ŝin antaŭen, ĝis ŝi ekaperis en iu interne brilanta tubo kaj flugis antaŭen. Ŝi ekkomprenis, ke ŝi estas mortanta, do strebis iel rezisti kaj kriis, ke ŝi ne volas. En tiu momento ĉio malaperis kaj ŝi eksentis nepriskribeble fortan doloron. Ŝi deĉifris tion, ke Dio donis al ŝi ankoraŭ tempon por povi ordigi sian staton kun mi kaj ne forlasi ĉi tiun mondon antaŭ Dio kiel edzino de la unua edzo, kiu ŝin batis.

Mi diris al ŝi, ke Dio ja estas nur unu kaj se por ŝi ne gravas, ke ni kristane geedziĝos en la eklezio de mia patro, kiu ebligas geedziĝon de divorcitaj personoj, mi strebos tion organizi kiel eble plej baldaŭ.

Mi elserĉis la plej proksiman komunumon de la husana eklezio, rakontis al ties pastoro Rudolf Němec, pri kio temas, kaj li klarigis al mi, ke preparo de geedziĝo daŭras minimume kelkajn semajnojn, sed estas esceptoj, kiam eblas ĝin efektivigi eĉ tuj. Kiel ekzemplon li klarigis, se la viro devas iri en militon, aŭ, kiel ĉi-okaze, se iu el la paro estas mortanta kaj volas foriri kiel parto de benita geedza paro.

Stanjo treege ĝojiĝis pro tio, mi veturigis ŝin al la preĝejo unuafoje por nia intervjuo kun la pastoro. La duan fojon, post du tagoj, ni jam revenis kiel



Kun la pastoro Němec post nia kristana geedziĝo

kristanaj geedzoj. Estas interese, ke tiu momento plilongigis al Stanjo la vivon je minimume du monatoj kaj ĉefe al ŝi revenis relative bona humoro. Ni sukcesis ankoraŭ plurfoje viziti la dimanĉan diservon kaj fine de la jaro ni ĝojatendis la novjaran diservon, sed tiu jam estis sen ŝi. La 31an de decembro ŝi havis plian atakon, ĉi-foje la sukuristoj diris, ke ili devas ŝin nepre veturigi en malsanulejon, de kie ŝi ne plu revenis kaj la 28an de januaro ŝi, 45-jara, mortis.

Mi povas ĵuri, ke por ŝia trankvila foriro el tiu ĉi mondo la pastoro Němec faris pli ol ĉiuj doktoroj. Kiam ŝi vivis sian lastan monaton en malsanulejo, li vizitadis ŝin kaj ĉiam donis al ŝi sanktan komunion kaj benon. Lastan fojon mi volis malpermesi tion al li, ĉar ŝi ne plu rajtis manĝi, nek trinki, oni manĝigis ŝin tra tuboj. Sed li trankviligis min, ke li donos al ŝi nur simbolan sanktan manĝon, do neniuokaze li al ŝi faros iun malbonaĵon.

Lastan semajnon ŝi ne plu povis paroli, tamen ni kapablis konversacii. Mi



Geedzoj Burkhard gastas ĉe ni

parolis kaj ŝi reagis per okuloj kaj mi sciis, ĉu ŝi diras jes aŭ ne. Komence, kiam ŝi iomete ŝanĝis la aspekton de la okuloj, mi demandis, ĉu ŝi vere diras jes, kaj ŝi ripetis tion. Poste mi demandis, ĉu tio signifas ne kaj tio restis sen reago. Tiel ni povis komuniki ĝis la antaŭlasta tago de ŝia vivo, post kiam ŝi jam restis en komato.

Sed reen al la tempo post nia dua geedziĝo (ja ni estis jam dek jarojn geedzoj laŭ civitana leĝo). Ŝi ricevis novan vivoelanon, ni ambaŭ aliĝis al KELI kaj eĉ al ĝia kongreso somere en Janské Lázně. Post la forpaso de Stanjo mi restis konvinkita kristano kaj plu vizitadis la diservojn en nia komunumo.

Tiusomere mi partoprenis la KELI-kongreson, kie mi ligis plurajn novajn amikajn rilatojn. Precipe mi multe parolis kaj diskutis kun Philippe Cousson, kiu poste fariĝis KELI-prezidanto, jam survoje, ĉar mi veturigis lin aŭte el Prago al la kongresejo, kaj precipe kun Adolf Burkhardt, kiun, kun la edzino, mi invitis survoje hejmen al mi, ili akceptis tion kaj ni havis pli da tempo pluparoli kaj amikiĝi. Mi ankaŭ vizitis kun ili pastoron Němec, kiu perfekte regis la germanan kaj kun ili sufiĉe longe interparolis.

Kun Adolf ni restis amikoj ĝis la fino de lia vivo en la jaro 2004. Mi ne forgesas nian lastan longan telefonan parolon, kiam li diris al mi, ke li eksciis, ke mi ne estas inter gratulantoj en la finpreparata omaĝlibro honore al lia 75-jariĝo kaj ke li jam petis la redaktoron s-ron Haupenthal aldoni min tien. Kaj ke tio ankoraŭ eblas, sed mi devas tuj skribe peti lin. Mi klarigis, ke mi havis tre malagrablan



Ekumena diservo en la husana ĉefpreĝejo en Prago. De maldekstre G. Berveling, P. Polnický, M. Nytra kaj A. Kronenberger

sperton kun tiu persono, pro kio mi ne volis esti menciita en la libro preparita kaj eldonita de li, sed se estas lia deziro (de Adolf), ke mi ja faros.

Mi skribis al s-ro Haupenthal peton esti envicigita, kion li jam sciis de Adolf, do estis neniu problemo. Sed mi petis, se mi tie jam estos menciita, ke mi kontribuu per artikolo, kiun mi tuj povas sendi pri la historio de ĉeĥoslovaka husana eklezio. Sed tio ne plu eblis.

Estis ankaŭ Adolf, kiu invitis min al Adoru-seminario en Strasburgon, kie mi ligis pliajn amikajn rilatojn, precipe kun pastro Bernhard Eichkorn (kiu sekve ankaŭ aliĝis al mia UK-karavano al Pekino) kaj al Ernst Leuze. Tiutempe mi jam konsideris min konvinkita kristano. Kaj tie mi esprimis miron, ke tiu grava verko, Adoru, aperis sen ISBN kaj ke ĝi fakte ne ekzistas en gravaj katalogoj ktp.

Sekve mi estis la unuan fojon alparolita, ĉu mi pretus eldoni kun mia ISBN ekumenan Biblion, nun preparatan de la ekumena komisiono de IKUE kaj KELI. Mia respondo estis, ke tio estus por mi granda honoro, sed mia financa kontribuo povas esti tre limigita. Mi tuj aldonu, ke la traktado daŭris ankaŭ post la seminario kaj finan kontrakton ni faris en la jaro 2002 dum la IKUE-kongreso en Kroměříž. ***

Mi jam menciis unu de mi organizitan ekumenan diservon, tiun en Bratislava. Por mi estis tre ĝojigaj momentoj, kiam mi povis iom kontribui al pliproksimigo de kristanoj el diversaj konfesioj. Do mi uzis ĉiun eblon por tion realigi. Tiel mi organizis ekumenan diservon ankaŭ lige al OSIEK-konferencoj en Prago (eĉ en ĉefpreĝejo de husana eklezio en historia kerno de Prago, tujapude de la Malnovurba placo) kaj en Svitavy, sed ankaŭ ene de IFEF-kongreso en Tábor, InPaSem en Dobřichovice, ktp. Krome mi partoprenis plurajn ekumenajn kaj KELI-kongresojn, du IKUE-renkontiĝojn en Ĉeĥio, Bibliajn tagojn, ĉie kun sincera revo pri alproksimiĝo de la ĝusta vero al mi. ***

Tamen, mi ne komprenas kial, sed

ĉiam eniradis en mian kapon multaj duboj, ĉu tio estas la ĝusta spirita vojo. Mi povis milfoje strebi min konvinki, ke kiam estas kredantaj homoj, kiujn mi konsideras pli saĝaj ol mi, inter alie ĉeĥa famkonata astronomo kaj aliaj, ankaŭ inter esperantistoj, ke do estas eraro miaflanke kaj ne flanke de la kristana religio. Krome, inter miaj amikoj estis relative multaj pastroj kaj pastoroj, en Esperantujo krom la nomitaj ankaŭ Max Kašparů, Wolfram Rohloff, Leif Nordenstorm kaj Alois Eder, mi jam menciis mian amikon ekster Esperantujo pastoron Skočdopole, do mi havas perfektan medion por resti centprocenta kristano. Kial do, diable, tiuj miaj ĉiamaj duboj ĝis nekredo, ke Biblio estas sankta libro?!

Se vin interesas la daŭrigo de mia "kristana kariero" bv. legi la menciitan libron. Vidu apartan priskribon en Dia Regno 2/2023.

1. Chrdle, Petr: *Mia vivo kun Esperanto* Dobřichovice: KAVA-PECH, 251 paĝoj, 15 EUR

2. La interkonsento el la jaro 1994 enhavas vortigon al mi tre proksiman: El tiu agnosko rezultas, ke la membroj de la Ĉeĥoslovaka husana eklezio kaj la Eklezio romkatolika sin reciproke dankeme agnoskas kaj akceptas kiel kristanoj, fratoj kaj fratinoj en Kristo, direktante sin per malnova regulo: En esencaĵoj unueco, en malgravaĵoj libereco, en ĉio amo.

---

## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus




### 10. novembro

*Mia Patro, gardu min kontraŭ la danĝeroj de la mondo kaj kontraŭ la pasio de senbrida kolero, avareco, egoismo kaj senameco. Anstataŭu tion per Via amo kaj saĝeco kaj paco*

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.

# Poděbrady — 800 jaroj

Tradukis kaj raportis Pavel Polnický, CZ

PODĚBRADY - ĉeĥa banurbo festis gravan jubileon. La 1-an de oktobro 1223 estis unuafoje menciita tiu loko en skriba dokumento. Solenaĵoj daŭris tri semajnojn kaj dume okazis multaj koncertoj, teatraj prezentadoj kaj sportaj okazaĵoj. Kulminis sabate (30.9) per alveturo de fama reĝo Georgo el Poděbrady kun multnombra festa akompanantaro. Dimanĉe krom aliaj programoj okazis, en baneja parko, publika ekumena diservo. La meditadon prezentis evangelia pastoro Martin Fér. Jen liaj vortoj:

Jam pli ol 800 jarojn vivas en tiu ĉi loko homa komunumo. Tio estas sufiĉe longa vico da jaroj. Kiom da generacioj trairis, kiom da eventoj okazis! Kiom da domoj estis konstruitaj kaj kiom jam estis detruitaj! Kiom da ŝancoj estis realigitaj kaj kiom da esperoj vanigitaj!

800 jaroj estas estimindaj kaj memorindaj – sed ni bone scias, ke plej valora por ni estas nuntempo. Kaj morgaŭo kaj postmorgaŭo. Kiun vojon iros nia generacio kaj kien ni direktos sekvontan? Kiaj estos niaj historietoj? Kion ni konstruos kaj kion ni volonte detruos? Kaj kiujn eblecojn ni eluzos kaj kiujn ni trankvile vanigos? Kaj grave, sur kiuj fundamentoj staros tio, kion ni konstruos?

Ni pastoroj rigardas biblion kaj strebas trovi en ĝi inspiron – sendube en malnovaj kazoj – pli aĝaj ol 800 jaroj – sed por ni tre aktualaj. En biblio estas ekzemple rakontaĵo pri ne tro gloraj urboj – Sodomo kaj Gomoro. Tiuj urboj estis prosperantaj, sed loĝantaro estis malbona – ke eĉ estis decidite pri ilia ruinigo. Tio povus esti tuta fino, sed vivis proksime viro, kiu tion opiniis neadekvata. Lia nomo estis Abrahamo kaj li opiniis, ke tio ne estas justa, tiel ne povas agi eĉ Plejaltulo – ĉu ne estas en tiuj malbonaj urboj kelkaj justuloj, kiuj ne povas finiĝi same kiel aliaj? Eble estas tiaj 50, 45 aŭ 30, ĉu nur 10? Tamen pro tiuj dek valoras tiujn lokojn lasi vivi. Ĉu ne povus ĝuste tiuj dek homoj esti espero por ŝanĝo? Abrahamo traktas kun Dio pri la sorto de tiuj urboj kaj preskaŭ sukcesis. Sed eĉ ne dek justaj troviĝis tiam.

800 jarojn estas tie homoj kune, eble pro tio, ke ĉiam estis trovitaj kelkaj homoj, pro kiuj valoris, ke la loko plu vivu. Ĉu tio estis klarvidaj kaj saĝaj urbestroj, doktaj gedirektoroj de lernejoj, inspirodonaj geinstruistoj. Eble pastoroj kaj pastroj, kiuj peris aliflankan rigardon de alilande. Organizantoj de diversaj societoj kaj kluboj, kiuj dediĉas siajn tempon kaj kapablecojn. Honestaj metiistoj kaj vendistoj, nekorupteblaj oficistoj, voktoj kaj policistoj. Sindonemaj kuracistoj, flegistinoj. Kaj ofte nur ordinaraj unuopuloj, kiuj kaŝis judon kaj savis lin antaŭ pogromo, akceptis rifuĝinton, ne disvastigis klaĉojn, kiujn ili aŭdis – aŭ nur havis kuraĝon preni

respondecon en momento, kiam ili povus diri, ke tio ne rilatas ilin. Sed tio nun ne estas grava, por mi sonas el tiu rakontaĵo ĝuste tiuj bagatelaj nombroj – **nur kelkaj unuopuloj, kiuj povus savi urbon**. Kelkaj unuopuloj, kiuj estas espero por la daŭrigo, por ŝanĝo, por savo. Sufiĉas kelkaj homoj, kiuj ne lasas sin devojigi de la plimulto, sed serĉas, kio estas bona; sufiĉas kelkaj homoj, kiuj ne vivas nur por si mem, sed laboras por aliaj. Nur kelkaj unuopuloj kaj la urbo havas ŝancon. La situacio povas ŝanĝiĝi.

Kelkaj "justaj" sufiĉas. Se tiuj estas plimultaj, des pli bone, sed ofte la homo devas trovi kuraĝon eniri la lukton, kiu havas ne certan rezulton. Kaj jes, ĝi povas fini per malvenko. Per Kruco, diras ni pastoroj. Sed sen la kruco ne estus renaskiĝo. Sen kuraĝo oferti ion, nenio ekzistus. Nenio, kio valoras.

Tian kuraĝon, paciencon kaj forton mi deziras al ni ĉiuj. Kaj esperon, ke tio havas sencon. Al la urbo mi deziras, ke en ĉiuj sekvontaj generacioj estu sufiĉe da tiuj, kiuj prizorgos, ke ĉi tie estos loko por la bona vivo kaj estos priskribotaj eventoj, kiujn valoros memorigi.



Reĝo Georgo



Martin Fér



Kongresanoj de EEK 2018 dum urba promenado

# Dek helpoj — pri la Dekalogo

## Sesa ordono — Ne mortigu (Eliro 20,13a)

József FARKAS, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj, tradukitaj de Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Unue mi montras kelkajn ekzemplojn, por ke ni povu kompreni, kiel multajn problemojn kovras tiuj du vortoj! Apartenas tie ĉi la milito, kaj la terura, moderna variacio de ĝi, la nuklea milito. Hodiaŭ jam estas tute klare, ke oni ne povas atesti militon el la teksto de Sankta Skribo. Tiu ĉi ordono vere devigas nin aktive kontraŭstari tiun ŝtaton, kiu armadas sin por amasmortigo, por nuklea milito.

Sed apartenas tie ĉi la alia demando: ĉu ŝtatoj havas rajton puni per morto? Plia demando estas la memmortigado. Kion ni pensu pri tiuj homoj, kiuj forĵetas sian propran vivon? Alia mizera demando estas la abortigo. Ankaŭ tio estas sub la ordono, ne mortigu. Ankoraŭ kelkaj demandoj: Ĉu oni rajtas mortigi diktatoron? Ĉu Brutus agis prave, kiam li mortigis Julius Cezar? Ĉu oni rajtas uzi armilon liberigi socion el tirano? Ankaŭ tien ĉi apartenas la demando de eŭtanazio, kiam oni rapidigas la mizerikordan morton per la helpo, kunlaboro de doktoro. Ĉu la ŝtato havas rajton fari leĝon pri ekstermado de damaĝaj homoj, aŭ steriligi fiulojn?

Tiuj multaj problemoj estas eliroj, branĉoj de io, kaj mi nun ŝatus montri la radikon, el kiu ili venas. Tie mi ŝatus montri la lumon de la evangelio, de la tuta Biblio.

La vortoj de Jesuo Kristo gvidas nin al la radiko. En la evangelio de Mateo en la kvina ĉapitro ni legas la sekvontan (5, 21–25): "*Vi aŭdis, ke estas dirite al la antikvuloj: Ne mortigu, kaj kiu mortigos, tiu estos en danĝero de juĝado; sed mi diras al vi, ke kiu koleras kontraŭ sia frato, tiu estos en danĝero de juĝado; kaj kiu diros al sia frato: Raka, tiu estos en danĝero de sinedrio; kaj kiu diros: Malsaĝulo, tiu estos en danĝero de Gehena de fajro. Tial, se vi prezentas vian oferon ĉe la altaro, kaj tie memoras, ke via frato havas ion kontraŭ vi, lasu tie vian oferon antaŭ la altaro, kaj foriru, unue paciĝu kun via frato, kaj poste venu kaj prezentu vian oferon. Konsentu rapide kun via kontraŭulo, dum vi estas kun li sur la vojo…*"

En tiu ĉi versiklo tio estas la plej rimarkinda, kion oni ne kutimas rimarki, ke kiam Jesuo parolas pri kolero, kaj pri koleraj partneroj, Li ne ĝenerale parolas pri homoj — li parolas pri fratoj. La greka teksto sendube tiel esprimas la penson de Jesuo. Se vi koleras pri via frato, vi estas en danĝero de juĝado. Ŝajnas ke Jesuo havis spertojn, ke inter homoj, kiuj vivas sub la sama tegmento, kutimas elformiĝi

grandaj streĉoj. La radiko de mortigado estas en la malamo de gefratoj, geedzoj, kiuj vivas sub la sama tegmento.

Ni trapensu simplan, ĉiutagan scenon: edzo kaj edzino estas koleraj, ili kverelas unu kun la alia per laŭtaj, amaraj vortoj. Kaj tiam alvenas neatendite gasto. Kio okazas en tiu ĉi situacio? Ili rapide ordigas siajn vizaĝojn, ridetas, kaj montras ĉarman paron, kiu en paco kaj amo vivas kune. Alvenas gasto, kaj provizore estas paco, kaj kiam poste foriras la gasto, ĉio daŭras same. Montriĝas, ke la gasto, la fremdulo estas izola materialo. La eksterulo staras inter la du polusoj, kiuj estas en terura streĉo unu kun la alia, kaj dum la fremdulo estas tie, ne estas eksplodo. Kio estas malantaŭ tiu ĉi fenomeno? Tio, pri kiu Jesuo aludas. Tie ĉi komenciĝas mortigo, tie ĉi estas la radiko de la afero. Ne estas malfacile respondi al tiu ĉi demando.

La esenco estas, ke mi volas vivi, kaj ĝenas min en mia vivo, ke vi estas tie ĉi. Vi signifas konkurencon al mi. Pro vi mi ne povas vere vivi. El tio, pro tio ekestas konflikto, forto, streĉo.

La malgranda infano tiel travivas tion: se mi ne havus fraton, mi rajtus manĝi ĉiun ĉokoladon, sed pro tio, ke mi havas fraton, mi devas disigi la ĉokoladon kun li. La frato signifas konkurencon. Kiam alvenas nova infano en la familion, la alia infano, kiu ĝis tiam estis la solulo, havas ĵaluzajn atakojn, povus, eĉ volus mortigi la fraton.

Tiun streĉon la infanoj nekaŝite, memnature sentas kaj travivas, kaj tiu streĉo estas en la tuta homa socio.

Timige klare ni vidas tion en la Malnova Testamento, en la historio de Kaino kaj Habel. Kaino tiel sentis, ke eĉ Dio pli multe amas mian fraton, neelteneble, ke pro mia frato mi ne havas veran vivon. Li foruzas la aeron, li formanĝas mian panon, kaj forprenas la benon de Dio de mi. Mia frato, Habel devas perei!

Jesuo pravas, kiam li parolas pri tio, ke la kolero streĉiĝas unuavice inter la fratoj, gefratoj, familianoj, kaj la eksteruloj silentigas tiun streĉon. La gefratoj malamas unu la alian, ĉar neeldirite ekzistas la konvinko, ke pro mia frato mi ricevas malpli, kaj se li mortus, mi ricevus pli multe. Tie ĉi estas la praa baz-formulo de mortigo. La homo — mi akcentas, ke la faliĝanta, pro la peko malsaĝa homo — ĉi tiel pensadas: "Li devas morti por tio, ke mi havu pli plenan vivon. Lia morto solvos mian problemon".

Tiun ĉi bazan penson de la faliĝanta, pekanta homo la kulturo subenpremas en la profundecon de subkonscio. Sed tiu ĉi instinkta penso de la faliĝanta homo vivas kaj laboras en ni ĉiuj: "Lia morto solvus mian problemon".

Al tiu ĉi homa pasio respondas la vorto de Dio: "Ne mortigu!"

Se ni nun detale vidas la justecon de Dio, en la lingvo de la malnova testamento, tiel ni povas diri la sesan ordonon: Homo, ne eraru! Ne pensu, ke la morto de via frato donos al vi vivon, evoluon, feliĉon, riĉecon. Ne estas la vero, ke lia morto solvos viajn problemojn. Ne estas la vero, ke se vi oferos vian fraton sur la altaro de via egoismo, tiam vi estos feliĉa. Ne estas la vero, ke vi devas mortigi lin pro tio, ke vi povu vere vivi.

La Malnova Testamento en tiu negativa formo esprimas tiun verecon.

Kaj venas la Nova Testamento, kaj mirakle suplementigas tion, en pozitiva formo diras la veron.

Per la lingvo, la historio, la vivo, la krucumado kaj la resurekto de Jesuo Kristo diras al ni la mesaĝon, ke ĵus kontraŭe: via propravola morto, via sinofero por la alia homo solvos vian problemon. Se vi povas sinoferi vin mem — tio solvos vian problemon.

Pli akre mi diras tiun duoblan verecon. La verecon de la malnova testamento ni povas tiel diri: kiam vi pensas, ke se vi mortigas vian fraton, tiam solviĝos via problemo, tiam vi movigas demonajn fortojn, kaj tiuj demonaj fortoj plenigos vian vivon. La Nova Testamento diras: se vi povas sinoferi vin mem, tiam moviĝas ĉielaj fortoj kaj benos vin per resurekto, per mirakla nova vivo, kaj benas ankaŭ lin, pri kiu vi sentas, ke estas via kontraŭulo. Se vi elektas la vojon de mortigo, tiam vi mobilizas demonajn fortojn, se vi elektas la vojon de sinofero, tiam vi mobilizas ĉielajn fortojn.

Per du ekzemploj mi ŝatus montri tion.

La plej malgranda ekzemplo estas la familio, kaj tie la ekzemplo de la abortigo. Kiam oni tiel pensadas: Mi ne volas infanon, kaj se hazarde estiĝas, mi mortigas ĝin. Pro tio mi mortigas ĝin, ĉar mi volas vivi, kaj mi sentas, ke tiu venulo estas mia kontraŭulo, li mallongigas mian vivon.

Oni ne diras, ne pensas tiel akre, sed mi nun tiel faras. Kaj kompreneble mi nun ne parolas pri tiuj situacioj, kiam sanaj aŭ aliaj seriozaj kaj akcepteblaj problemoj estas malantaŭ tiu ĉi decido. Mi nun parolas pri tiu kulpa situacio, kiam estas la decido: ĉu infano estu aŭ aŭto? En tiu ĉi situacio la infano signifas konkurencon, kiu malebligas, ke mi havu aŭton. Ĝi devas morti, ke mi povu vivi. Tiu estas la situacio, kiam la Malnova Testamento diras, ke vi tute eraras, ĉar per nenio vi havos pli da vivo, se vi mortigos vian embrion, ol vi ricevus donace de Dio, se vi havus tiun bebon. La vorto de la Nova Testamento diras, ke vi resurektus al mirakla, nova vivo, se vi povus sinoferi pro li.

Alia akra formulo: Se vi mortigas vian embrion por vi mem, vi liberigas demonajn fortojn, kiuj pli frue/malfrue, pereigos vin, vian familion, vian havaĵon, vian aŭton. Kaj se vi oferos vin pro via embrio, tiam aperos ĉielaj fortoj, la beno, la amo kaj la ĝojo de Dio. Tio estas la mesaĝo de la Biblio.

Ni vidu la problemon ankaŭ tra la plej granda ekzemplo: la milito.

Ankaŭ tie ĉi estas la sama situacio: la konkurenco signifas danĝeron al mia vivo. Mi devas pereigi gin, por ke mi povu vivi riĉan vivon. Ĉirkaŭas nin tiu ĉi terura praktiko — kaj ni estu objektivaj — tio okazas, kaj ne gravas, kiu ideologio estas sur la flagoj.

Tiu freneza penso gvidas la mondhistorion al la direkto de la mondkatastrofo: se mi pereigas lin, tiam mi vivos pli bone. Ni pensu pri la terura mondstreĉo, pri la militoj, en kiuj ni vivas. Pli proksime kaj pli malproksime armeoj militas, homoj mortigas unu la alian, kaj ni sentas en nia vivo la demonan fajron. Terura estas la demonismo!

Ĉar al la milito bezonas malamo. Por tio, ke la soldatoj entuziasme batalu, unue devas instrui ilin malami. Mi denove diras la dian veron: Nenion solvas se unu lando sukcese militas kontraŭ alia lando. Neniu problemo solviĝus, sed liberiĝus teruraj demonaj fortoj, pli kaj pli ili fortiĝus kaj ĉirkaŭus la tutan mondon. Ĉiuj homoj devus malami iun. Ne eblus vivi en por-ekzistenco, nur en kontraŭ-ekzistenco. Kaj en la familio kaj en la mondo konfirmiĝas la tezo: la morto, la mortigo solvas nenion. Tio pruviĝas kaj en la individua praktiko de abortigo kaj en la kolektiva praktiko de milito. La mesaĝo de Dio estas: Ne mortigu. Ne esperu, ke la morto de la alia homo solvos vian problemon.

Kaj ne nur tio estas en tiu ĉi ordono, ke vi ne mortigu la alian homon, sed ankaŭ tio estas en tiu ĉi ordono, ke vi ne mortigu vin mem. Ĉar la homo estas tiel malsaĝa, ke li mortigas ankaŭ sin mem. Kaj mi ne pensas nur pri la memmortigo, kiam iu rapide mortigas sin mem, sed mi pensas ankaŭ pri la daŭra memmortigo, kiam iu dum sia tuta vivo mortigadas sin mem.

Mi prenas ekzemplon el la korpa vivo. Oni scias, ke se iu fermas la sang-cirkuladon, tiu rapide kaŭzos problemon. Eĉ se en la plej malgranda parteto de la plej malgranda fingro iu fermas la sang-cirkuladon, tiam mortas tiu ĉi parteto, ke de tiu parteto la morto disvastiĝas al la tuta korpo.

Kaj tio validas pri la tuta vivo. La penso de Dio estas, ke ni havu vivon, kaj ke ni riĉe, feliĉe vivu. Ni ne fermu eĉ unu parteton de nia spirita vivo, ĉar kiun ni elfermas el nia vivo, kiun ni kontraŭ-die sufokigas en nia vivo, tiu portos morton al nia vivo.

Mi legis notojn de psikologo. Li rakontis surprizigan ekzemplon de tre riĉa merkantisto, kiu iris al la psikologo, ĉar li havis multajn problemojn, lia koro ne funkciis tute bone, li havis doloron en la stomako, li ne povis dormi, do li petis helpon de la psikologo. Dum la terapio ili priparolis la vivon de la riĉulo, kaj malkovriĝis, ke li en sia juna aĝo multe ŝatis pentri. Sed venis la “vera” vivo, li devis labori, kaj li devis forlasi tiun “vanan” okupon. Li fermis ion en sia vivo. La sang-cirkuladon de iu interesiĝo, de iu riĉeco li fermis. Kaj disvastiĝis la morto en lian tutan vivon.

La psikologo analizis tiel: li ne simple nur pentris, sed la pentrado signifis ankaŭ iun vidmanieron, iun vivformon. Li antaŭe serĉis la belecon, li dediĉis tempon ĝui la belecon, li havis tempon serĉi la harmonion kaj akcepti la Ordon. La esenco estas, ke kiam li pentris, tio signifis tutan viv-sintenon.

Tio elfermiĝis, tion mortigis la negoca, merkata vivo, kaj tiu sinteno gajnis, ke devas venki kontraŭ la konkurenco, devas atenti, ĉar miaj kontraŭuloj volas mian havaĵon. Kaj venis la angoro, la senfina batalo, la ĉiama maltrankvilo — kiuj gvidis lin rekte al la morto.

Ekstraordinare instrua estas tiu ĉi historieto. Dio donacis al tiu viro la ĝojon de la pentrado, kaj li malsaĝe — pro ekonomia intereso — elfermis tiun ĉi kapablon, talenton. Kiel multaj homoj elfermas en sia animo la deziron pri Dio,

ĉar hodiaŭ tio ne estas gajna aŭ profita. Ili pensas, ke tio estas iu nesignifa malgrandaĵo, kiun senkulpe eblas elfermi. Sed kiu elfermas tiun ĉi spiritan sang-cirkuladon, tiu estas vere kaj laŭvorte memmortigulo. Tiu malrapide kun multaj suferoj mortigas sin mem.

Kiam ni aŭdas la ordonon "ne mortigu", en tiu ĉi ordono estas, ke vi ne mortigu alian homon, sed ankaŭ estas, ke vi ne mortigu vin mem!

La dekalogo ne temas pri Dio, multe pli multe temas pri homo. En la sekreto fariĝi homo tiu ĉi ordono diras: Homo, komprenu, ne tiel vi fariĝos vere homo, se vi mortigas vian rivalon! Sed la sekreto de la vivo estas la kunlaboro: esplori la fraton, kiun ĝis nun vi vidis kiel kontraŭulo. Malkovri en li la donacon de Dio, sinoferi por li, vivi por li.

La Malnova Testamento negative diras tion: Ne mortigu! Ne mortigu la alian homon, vian fraton, ĉar tio solvas nenion.

Jesuo daŭrigas la penson kaj diras: Vi lernu vivi por via frato, sinoferi por li, propravole morti por li, kaj tiam venos diaj fortoj kaj donos al vi novan vivon.

Tiu ĉi nova vivo estas la vera homa vivo, humana vivo, kaj tiu vivo estas, al kiu vivo Dio kreis vin.

---

**Letero**

Mi kaptas okazon montri kion mi faras en mia servo en la preĝejo kaj dezirus ke iom post iom mi prezentu ĝin al esperantistoj en la mondo pere de la revuo ´Dia Regno´. Jes, mi instruas la vorton de Dio ,sed ankaŭ konsilas kaj preĝas por homoj kiuj venas al mi por serĉi helpon en siaj vivoj. Precipe junuloj kaj virinoj. Plejparte de mia tempo mi uzas por konsili tiuj, kiuj suferas diversprobleme en la vivo. Ekzemple tiuj, kiuj suferas malsane, psike, interrilate, k.t.p. Ekzemple estas virino, kiuj edziniĝis kaj dum pli ol 7 jaroj ne naskis idon kaj la geedziĝo iĝis kverela. Mi donis konsilon pri la geedziĝo kaj preĝis por ŝi. Dank´ al Dio, ke ŝi naskis infanon. Nun la familio estas tre feliĉa kaj la rilato jam rekonstruiĝis. La infano estas 4-monata. Ankaŭ mi konsilis kelkajn junulojn ne resti sen laboro kaj kelkaj jam trovis etajn laborojn, kiuj ebligas al tiuj junuloj enspezi monon. (red: legu pli en Dia Regno 4/2023)



Jen Neema Biseko kun infano suĉanta. Per instruo kaj konsilo de Dismas ŝi naskis infanon.

***Dismas Robert Kusaya, Tanzanio***

# Kristana Kongreso
## 73a kongreso de KELI

*" ... Justeco kaj paco sin kisas ..."*
Psalmaro 85,10

3–10 aŭgusto 2024
en Vác, Hungario

Karaj Gefratoj,

hungaraj kristanoj denove kore invitas vin partopreni Kristanan kongreson en nia lando!

La urbeto Vác situas per cca 40 km norde de Budapest, apud la Danubo. La ĉefa vojo Nr. 2, inter Budapest kaj Bratislava preteriras ĝin, kaj rekta trajno kaj buso ofte iras tien el Budapest.

Vác estas sidloko de diocezo de Romkatolika Eklezio. Funkcias tie Romkatolika Altlernejo (Apor Vilmos Katolikus Főiskola), kies kolegio estos nia kongresejo. Adreso de la kongresejo estas: Schuszter Konstantin tér 1-5., 2600 Vác.

La granda baroka konstruaĵo estas en la centro de la urbeto, ĉe la ĉefplaco troviĝas ankaŭ la episkopa palaco kaj belega katedralo.

En la kolegio estos je nia dispono loĝejetoj kun du dulitaj ĉambroj (kun banĉambro kaj necesejo), manĝ-salono, kapelo kaj preleg-salono (ekipita per la necesaj teknikaĵoj) – do ĉio sub unu tegmento.

La proksimeco de Danubo kaj Danub-kurbiĝo nepre meritos ŝipekskurson!

Kaj interne kaj ekstere ĉio, kio ĉirkaŭos nin, estas preta servi por nia bono. Ni petu nian Sinjoron por beno, kaj preparu niajn korojn por akcepti tiun benon!

En ĉi tia hejmo ni estos kune en la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu tion diras: "Ĉar kie du aŭ tri estas kune en mia nomo, tie en ilia mezo estas ankaŭ mi." (Mateo 18, 20)

Ni esperas vian partoprenon en tiu kristana kunestado.

*Loka Kongresa Komitato*

# Kristana Kongreso
## 73a kongreso de KELI

*" ... Justeco kaj paco sin kisas ..."*
Psalmaro 85,10

3–10 aŭgusto 2024
en Vác, Hungario

Vi akceptas per la Aliĝilo la sekvontajn kotizojn:

**Tarifo A:** ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko
**Tarifo B:** ĉiuj aliaj landoj

**Aliĝ-kotizo** (ne repagebla) por ĉiu persono pagenda antaŭ la kongreso

| | | |
|---|---|---|
| ĝis 31 12 2023 | **A**: 20,- EUR | **B:** 40,- EUR |
| ĝis 31 03 2024 | **A:** 30,- EUR | **B:** 50,- EUR |
| post 01 04 2024 | **A**: 40,- EUR | **B:** 60,- EUR |

**Kongresa kotizo pagenda en la kongresejo:**

**A:** 300,- EUR **B:** 340,- EUR
Krompago por unulita ĉambro: + 60,- EUR
La kongreskotizo inkluzivas tranoktojn, manĝojn kaj ekskursojn

**Grava atentigo!** La menciitaj kotizoj inkluzivas neniun asekuron.
Ĉiu kongresano por kongresaj tagoj prizorgu por si la asekuron en sia lando.

**La aliĝon oni traktos kiel validan** post ricevo de aliĝ-kotizo!
Aliĝ- kaj kongres-kotizojn oni povas sendi al la banka konto de:

RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes:
Ĝiro-nro (IBAN): HU59 1177 5070 1279 2889 0000 0000
SWIFT: OTPVHUHB

aŭ al la konto **kelk-p** de KELI ĉe UEA

aŭ al la konto de KELI ĉe CIC Lyonnaise de Banque en Francio:
KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale
Ĝiro-nro (IBAN): FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104
SWIFT: CMCIFRPP

**La aliĝilon sendu al:**

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
Perletere: HU-1400 BUDAPEST, Pf.: 5.
E-mail: agnes@raczkevy-eotvos.com

# ALIĜILO

**Sendota al RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes**
**H-1400 Budapest, Pf.: 5. Hungario, aŭ agnes@raczkevy-eotvos.com**

**Mi aliĝas al 73a KELI Kongreso 3–10 aŭgusto 2024 en Vác, Hungario**

S-ro (   ) /S-ino (   )  Persona nomo: ......................................................

Familia nomo: ..................................................................................

Adreso:

Lando (en Esperanto): ....................................................................

Urbo/vilaĝo: ........................................  Poŝtkodo: ...........................

Strato kaj numero: ........................................................................

Telefono: ......................................................................................

Retadreso: ....................................................................................

Mi preferas dividi la ĉambron kun: ..........................................................

Mi preferas loĝi sola: (   )

Mi planas alveni je (dato kaj horo, se eblas): ...........................................

Mi planas foriri je (dato kaj horo, se eblas): ............................................

Mi planas alveni per: aŭtomobilo (   ), trajno (   ), buso (   ), aviadilo (   )

Mi estas vegetarano: (   )   Mi bezonas alian dieton: ...................................

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon: ......................................................................................

Alian programeron: .........................................................................

Programerojn por distra vespero: ......................................................

**La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo, kiun eblas pagi:**

al la banka konto de RÁCZKEVY-EÖTVÖS Ágnes (vidu apudan paĝon)

aŭ al konto kelk-p de KELI ĉe UEA (vidu apudan paĝon)

aŭ al konto de KELI ĉe CIC Lyonnaise de Banque en Francio (v. apudan paĝon)

Mi permesas, ke la fotoj faritaj dum la kongreso oni rajtu publikigi kaj en la revuo Dia Regno kaj surrete.       jes (   )     ne (   )


Dato: .......................  Subskribo: ..........................................................

# Vác, Hungario

Apudaj fotoj el Vikimedia komunejo sub licenco CC 3.0



Katolika Altlernejo Vilmos Apor. Fotis: Ediedi




Mezepoka kelo en la centro de Vác. Fotis: Kontiki / Indafotó



Katedralo de Vác. Fotis: Attila Terbócs



Ŝipa haltejo. Fotis: Gergely Dóra Viktória




Situo de Vác en norda Hungario

# Informetoj

## Estimataj kaj karaj membroj de KELI kaj abonantoj de Dia Regno

Dum lastaj monatoj mi kelkfoje bezonis rapide kontakti iun kaj mi konstatis, ke mi pri multaj el vi, konas nur nomon kaj poŝtadreson. Mi tre petas vin plenumi aldonitan demandilon kaj sendi ĝin al mi. Vi povas sendi ĝin en letero (kun belaj poŝtmarkoj) al mia adreso:
*Pavel Polnický, Lidická 939/11, 291 00 Poděbrady*, *Ĉeĥio*
aŭ skanigitan al: *polnickypavel@seznam.cz*.

Tiujn datenojn uzos NUR MI por kontakti vin en diversaj problemoj kaj gratuli vin pri viaj vivjubileoj.

Se vi ne volas iujn informojn doni al ni, sendu min demandilon sen tiuj informoj. Se vi ricevas pliajn ekzemplerojn de DR, vi transdonu demandilon al ĉiuj personoj, al kiuj vi sendas DR.

Sincere dankas kaj salutas vin
***Pavel Polnický***
sekretario de KELI

## André Sandoz

*Vi ja estas vaporo, kiu mallongan tempon montriĝas kaj poste malaperas.* Jakobo 4,14

Nia kara membro el Svislando forlasis nin la 19an de oktobro en sia 89a jaro (*1935). La lasta kongreso, kiun li povis partopreni, estis en Strasburgo 2015.

La enterigo okazis la 24an de oktobro en la Templo de Farel en La Chaux de Fonds.

Li restu en paco.



Dum ekumena kongreso en Strasburgo 2015.

# Kiel cerv' pri akvofont'

laŭ Psa 42




3. Tamen mi esperas Vin.
Kial premu min malĝoj'?
Roko mia, Savo mia,
iam Vi elmontros Vin.

4. Vin, ho sankta Triunu',
Patro, Filo kaj Spirit',
Vin mi laŭdu, Vin mi gloru
nune, plue, en etern'. Amen.

KIEL CERV' PRI AKVOFONT' • laŭ Psa 42 • M kaj E: Albrecht Kronenberger 2023-09-07